Heinrich Heine,

# Al vi diamantoj kaj perlo

*tradukita de Leopold Blumental*

Al vi diamnntoj kaj perloj -
Kaj ĉio al via inklin' ....
Vi havas plej belajn okulojn -
Plu kion deziri, knabin'?

Pri viaj plej belaj okuloj,
Laŭ volo de l' Muzo-estrin',
Mi kreis la kantojn eternajn -
Plu kion deziri, knabin'?

Per tiuj plej belaj okuloj
Kruele turmentis vi min
Kaj min vi detruis ĝisfunde -
Plu kion vi volas, knabin'?

*Traduko de la Germana poemo "Du hast Diamanten und Perlen" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Leopold Blumental *(Leo Belmont, ∗1865-03-08 – †1941-10-19).*

*Arg-836-1683 (2013-02-22 16:24:31)*

*La trsduko troviĝas en la dana Esperanto-revuo "Dansk Esperanto Tidende" el la jaro 1942. Pri la tradukinto vidu la retejon* http://eo.wikipedia.org/wiki/Leo_Belmont*.*

Heinrich Heine,

# Du hast Diamanten und Perlen

Du hast Diamanten und Perlen,
Hast alles, was Menschenbegehr,
Und hast die schönsten Augen -
Mein Liebchen, was willst du mehr?

Auf deine schönen Augen
Hab ich ein ganzes Heer
Von ewigen Liedern gedichtet -
Mein Liebchen, was willst du mehr?

Mit deinen schönen Augen
Hast du mich gequält so sehr,
Und hast mich zugrunde gerichtet -
Mein Liebchen, was willst du mehr?

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17).*

*Arg-836-1682 (2013-02-22 16:09:59)*